

Laŭokaza Novaĵletero.

Organo de la

Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo.

P.O. Kesto 25041,
3001HA Rotterdam,
Nederlando.

IKEF
★
1984

Numero 12;

junio, 1986.

Ne-fermita letero de la Prezidanto de I.K.E.F.

Estimataj Membroj de IKEF;

Estimataj legantoj de la Laŭokaza Novaĵletero:

Ekde mia unua ne-fermita letero en la Laŭokaza Novaĵletero, (LN-o), n-ro 5 de aprilo, 1985, pasis jam dek kvar monatoj.

En tiu tempo, ni povas konstati kontentigan evoluon de nia afero, kiu montras sin jene:

- oficiala Fondkunveno dum la UK en Aŭgsburgo, je la 6-a de aŭgusto, 1985;
- duobligo de la membraro, de 21 ĝis 42 membroj;
- aktiva ses-persona Estraro - nun ses-persona pro la lastatempa nomigo de S-ro Roland Rotsaert, Belgio;
- pozitiva financa stato, kaj
- unua, laŭstatuta estrara raporto, tiu por 1985.

Do, ni povas diri, ke nia afero entute kreskas, kvankam malrapide.

Bedaŭrinde por ni, S-ro Lawrence Mee, nia Ĝenerala Sekretario, (ĜS), intencas emeritiĝi komence de 1987, kaj tiam translokiĝi al sia hejmlando, Britio, kaj per tio ĉesi sian aktivan estrarlaboron. Vi certe povas imagi, ke tio estos grandega perdo por IKEF kaj aparte ankaŭ por mi mem, ĉar estis li kaj

mi kiuj, ekde novembro en 1983, pridiskutis, preparis kaj fine lanĉis la aventuraron I.K.E.F.

Kaj estas li, sur kies ŝultroj kuŝas la plej multa laboro, nome la ofico de la Financa Konsilanto, (FK; kasisto; kontotenisto), kaj la ofico de Ĝenerala Sekretario, (ĜS; redaktado de la LN-o; korespondado kun membroj kaj informpetantoj; gvidado de komunikado inter la Estraranoj).

Kvankam restas ankoraŭ kelkaj monatoj ĝis lia eligo el la Estraro, kaj do tro frua ankoraŭ por laŭdado, mi jam nun volas kore danki mian kamaradon kaj kunbatalanton, Lorenc', pro lia oferema kaj agema laboro.

Kiel ni plumarŝu sen S-ro Mee? La Estraro jam decidis, ke ni bezonas du posteulojn por li: unu por esti ĜS kaj alia por esti FK. Ankaŭ nia Statuto intencas tion, (alineo 7.2). Entute, IKEF povus nomi maksimume sep Estraranojn. Ĉar ni estas aktuale ses, kaj ĉar S-ro Mee eksigkos, ni povus nomi du novajn anojn se kandidatoj prezentigus. La ĜS devus havi spertojn en redaktado, kaj la FK spertojn en kas-kaj konto-tenado.

Kiel trovi la du novajn Estraranojn? Ni jam kontaktis mem-

brojn, kiuj al ni ŝajnas taŭgaj por tiaj postenoj. Tamen, se vi mem, kara samideano kaj leganto, havas la kapablojn kaj volon transpreni unu el la postenoj, ne hezitu vin anonci ĉe mi kaj kiel eble plej baldaŭ.

Nun mi transiras al la temo de estonta agado. Pri tio mi havas kvin ĉefajn proponojn, jenajn:

1 ĉiu opa membro el ni renkontigu kun aliaj membroj kiel eble plej ofte. Bonvolu uzi ĉian eblon, (ekzemple en ferioj, en privata aŭ komercafera vojaĝo, aŭ simile), por viziti proksime loĝantan membron; por interkonatiĝi, por interbabili pri IKEF-aferoj, por interŝanĝi opiniojn kaj spertojn. Skriba interkonatigado ne sufiĉas;

2 bonvolu transpreni kaj efektiviigi iun memelektitan taskon sur la vastega kaj varirika kampo de komerco/ekonomio/ekonomiko, el la taskaro ĉefe fiksita en la Statuto, (alineo 4.1). Devus esti agado laŭ via persona kapablo kaj spertoj, laŭeble proksime al via ĉiutaga, profesia, komerc-ekonomia laboro, ĉar tie vi estas spertulo kaj tie vi agadas plej konvinke kaj efike, kaj per tio vi atingas la plej grandan sukceson.

Ekzemple: mi persone, krom la okupo pro mia prezidanteco, koncentras mian laboron al la havigo de reklamanoncoj de germanaj firmaoj por revuo MONATO; al la ribado de artikoloj por MONATO kaj al la korespondado Esperantlingve kun kelkaj liverantoj en mia ĉiutaga okupo kiel aĉetsekciestro en industria entrepreno;

3 se vi sukcesas en iu aparta agado, nepre anoncu tion kaj viajn spertojn al la ĜS, por publikigo en la LN-o. Tio por ke aliaj membroj eksciu pri ĝi kaj povu fari la saman en sia(j) lando(j).

4 bonvolu pli respondi kaj reagi al la demandoj starigitaj en la LN-o, por ke ni povu ekscii vian opinion pri tia temo. Plue

estus bonege, se vi surkonstruus vian agadon sur antaŭan agadon de alia membro. Ekzemple: kiam S-ro Gilbert publikigis la oficalan katalogon de sia Komerca Ĉambro en Bar-le-Duc pri produkt-oj kaj firmaoj en la departemento Meuse, (pr: moz'), ankaŭ kun la lingvo, Esperanto, vi estis povanta alskribi en Esperanto kelkajn tie indikitajn francajn firmaojn en tiu regiono, pri iu demando kiu vin interesas. Per tio, tiuj entreprenoj rimarkus, ke Esperanto vere vivas kaj ke S-ro Gilbert ne simple priskribis fantomon montran.

5 la faktermina laboro por la kampo ekonomio estas la plej grava el nia taskaro. Ĝi efektive ankoraŭ ne komenciĝis. Sed interne de la Estraro ni pridiskutas konvenan metodon. Hodiaŭ, mi volas nur atentigi vin pri tio, kaj peti vin laŭeble baldaŭ estu preta kunlabori en tiu kampo. Se, ekzemple, vi rimarkas nocion en via nacia lingvo, por kiu ne ekzistas Esperanta termino, nek en ĝenerala nek en faka vortaro, vi bonvolu noti ĝin en aparta loko, (kaj, se vi volas, ellaboru tradukproponon en la i.l. por posta uzado). Iutage, ni bezonos kaj elpetos tiun liston de vi.

Tiom por hodiaŭ! Mi dankas pro via atentemo. Feliĉa persono mi estos, se post pliaj dek du monatoj, mi povos konstati la saman progreson en 1986 kiel en 1985. Multe da ĝojo, kaj sukceson en viaj laboroj, mi volas ke la proksimaj monatoj alportu al vi ĉiuj,

Franz Josef Braun.

INTERKONATIĜO

Kun plezuro ni bonvenigas novajn membrojn al nia Membro-listo.

Denove, la aldonaj nomoj donas apartan kontentigon al ni, ĉar per ili ni aldonas tri novajn landojn al nia listo. Kaj krom diri, Bonvenon! al konata ekonomikisto, ni notas kun plezuro, ke nova branĉo de komerco, tiu de turismo, estas nun reprezentata inter niaj membroj. (Ke la hotelo de nia nova membro

en Britio situas en tre ĉarma regiono en tre vizitinda lando, ne estas sekreto!)

La du aliaj nomoj, en evoluinta lando en Afriko, aldonigas al la listo pro donacoj al nia Subtena Fondaĵo. Agnoskante kun sincera danko tiujn donacojn, ni devas aldoni, ke la Fondaĵo estas malplena, sed nia listo de kandidatoj daŭre plilongigas.

Membro-listo je 1986 - 06 - 15.

- 39 Foss, S-ro Paul, hotelestro;
Long House Hotel, Pilton, Som., BA4 4BP, Britio;
- 40 Wickström, S-ro Bengt-Arne, universitata ekonomikisto;
Instituto por ekonomiko, Universitato de Bergen,
5000 - Bergen, Norevegio;
- 41 Gbeglo, S-ro Koffi, komerca reprezentanto kaj teknikisto
pri trinkaĵoj;
B.P. 13169, Nyékonakpoè, Lome, Togolando;
- 42 Agbemadon, S-ro Mensah B.A., instruisto pri vendado;
CEG de Zalive, B.P. 134, Aneho, Togolando.

Korekto por la membro-listo.

De S-ro Desuere, en Zaventem, Belgio, ni ricevis averton pri eraro, kiu enŝteligis en nia pasintmonata raporto. Ĉiuj legantoj estas petataj noti, ke la stratadreso de S-ro Desuere estas:

Woluweveld 69, 1940 Zaventem, Belgio.

Ni pardonpetas pro la eraro, kaj petas atentigon pri iuj ajn eraroj de detaloj en publikigitaj informoj pri niaj membroj.

Niaj mecenatoj

Ni esprimas apartajn dankojn al Membroj kiuj faris kroman pagon, aŭ por donaci sumon al la ĝenerala kaso, aŭ por la Subtena Fondaĵo.

Dankon! al:

S-roj Arocha, Novaković,
Picasso, Polerani kaj Wiersch.

Daŭra enigmo por ni

Ankoraŭ 'svebas' en la kontaro la sumon de dudek guldenoj, pri kiu ni faris raporton en la pasinta LN-o.

Ni afable petas la kulpanton nepre kompatu vian Financan Konsilanton, per klarigo de la celo de la pago.

Anticipan dankon!

ADMINISTRADO

*La Ĝenerala Sekretario
raportas:*

1. En la nomo de la Estraro, mi formale anoncas la plenan akcepton, pere de la Perposta Referendumo, de ĉiuj punktoj proponitaj por akcepto. Ĉiuj ricevitaĵoj estas aprobaĵoj, kaj la nura amendpropono ricevita estas tiu, kiu volas aldoni la nomojn de S-ro Braun kaj S-ro Gilbert por ricevi apartajn dancojn de la membraro pro valoraj servoj alla Fakgrupo dum la kono-erna jaro;

2. Sekve de tiu plena aprobo, mi formale anoncas, ke S-ro F.J. Braun kaj D-ro M. Picasso regule elektigis al la Estraro por du-jara servperiodo ekde la 1-a de julio, 1986;

3. En la nomo de la Estraro, mi anoncas la nomigon de S-ro Roland Rotsaert, el Brugge, en Belgio, al membreco de la Estraro ekde la 8-a de majo, 1986. S-ro Rotsaert estos prezentita kiel kandidato dum la Jarkunveno en la proksima jaro, kaj ĝis tiam partoprenas en la aferoj de la Estraro sen formala elekto. La Estraro ne havas dubon, ke la nomigo de S-ro Rotsaert havas la plenan aprobon de la membraro.

Lawrence Mee,
Ĝenerala Sekretario.

Rotterdamo,
1986-06-15.

Limdato por la proksima Novaĵletero estos la 15-a de aŭgusto tie ĉi en Roterdamo.

Respondeca redaktoro kaj eldonanto de la Laŭokaza Novaĵletero estas S-ro Lawrence Mee.

La poŝtadreso de la Fakgrupo:

Fakgrupo Komerca,
Postbus 25041,
3001 HA Rotterdam,
Nederlando.

IKEF-a kunveno dum la
Universala Kongreso
en Pekino

La detalaj aranĝoj por la ne-formala kunsido de IKEF dum la Pekina Kongreso de Esperanto, (dato, komencho kaj salono), ankoraŭ ne estas konataj al ni, sed laŭ informoj ricevitaĵoj, tiuj detaloj troviĝos en la Kongresa Libro, disdonota al ĉiuj Kongresanoj je alveno de la Kongresejo se ne pli frue ol tio.

La kunsido okazos sub la prezido de nia Prezidanto, S-ro Franz J. Braun, kun ne-formala tagordo. Ni havas esperojn nun, ke du aliaj Estraranoj ĉeestos, kaj D-ro Werner Bormann antaŭlonge anoncis sian pretecon ĉeesti kaj preni rolon de anstataŭanto de Estrarano. Ni ricevis konfirmon, ke S-rino Wang Yuchin, de la Ĉina Akademio de Sciencoj, intencas partopreni en la kunsido. Ni ripetas nian pli fruan vokon al niaj propraj Membroj, nepre partopreni en la kunsido, kaj tiel doni ankaŭ vian subtenon al nia Prezidanto. Ni memorigas niajn Membrojn, ke la ĉefa celo de la kunveno estas disdoni informojn pri IKEF, kaj respondi demandojn aŭ/kaj komentojn de ne-Membroj, sed tione malhelpas, ke Membroj faru komentojn pri la aferoj de la Fakgrupo.

Lawrence Mee
Ĝenerala Sekretario.

Ni ricevis peton fari kelklinian aludon al starigata asocio, kaj pensas, ke ĝi havas intereson por kelkaj niaj membroj. La Asocio Internacia Reduktanta la Poluciojn Universalajn Respirablajn, (AIRPUR), estas ligo kontraŭ tabako kun la celo protekti la NE-fumantojn. Petu informojn ĉe:
AIRPUR, 142 rue du Thier-à-Liège
4000 Liège, Belgio.

Ne-fermita letero.

Kiel efektiviĝi nian IKEF-econ?

[alvoko al IKEF-kolegoj]

Kvankam multaj samideanoj malaprobas la ideon profiti el uzado de la i.l. por komercaj traktadoj, nia grupo tamen naskiĝis, kaj nun - malrapide - kreskas.

Kvankam multaj malamikoj de Esperanto daŭre diras, ke la lingvo estas senutila por internacia komerco, kaj multaj Esperantistoj klopodas konvinki tiujn malamikojn pri ĝia taŭgeco, ni estas, post du jaroj, ankoraŭ nur kvardeko da kolegoj.

Kvankam ni estas malgranda minoritato, nia tasko estas eĉ duoble granda kaj sen ia dubo grava: ni devas fakte konvinki ambaŭ grupojn, kaj la Esperantistojn kaj la aliajn.

Tute simple: ni devas, per nia organo, la Laŭokaza Novaĵletero, daŭre interrilati inter ni, konigante niajn interesojn, kaj helpante nin mem.

Mi havas proponon, jenan. La 'komercaj', (aŭ komercontaj), kolegoj, membroj de IKEF, sendu sian 'identecŝildon' por aperigo en la LN-o. Tiu ŝildo enhavu, krom personajn detalojn kaj kompetencon, liston de la varoj pri kiuj ŝili havas intereson, en la kampoj de aĉeto-vendo, importiporti, aĉetigi aŭ reprezenti, (ekzemple al lokaj komercitroj).

Jen ekzemplo de tia ŝildo:
Marco Picasso; Vedano-al-Lambra, Italio;
- konsilisto pri merkato;
- lingva eblecoj: angla/hispana/franca;
- kompetenco: surmerkato de nutraĵindustriaj maŝinoj;
- eksportaj deziroj-eblecoj: maŝinoj por produktado kaj konservado de nutraĵoj;
- importaj eblecoj: bonkvalita fiŝo;
- rilatoj: (kun industriistoj) peranto.

Per tia ŝildo, Membro de IKEF povas konigi:

- eblecojn rekte interrilati internacie;
- eblecojn helpi kolegojn kiuj serĉas interrilatulojn.

Tiu dua aspekto estas la pli signifa, miaopinie, kaj laŭ la fona idearo de Esperanto, kaj laŭ la celoj de nia Fakgrupo. Nur per tiu ĉi sistemo, la anoncetoj en la LN-o estos signifaj kaj efikaj; neniu certe anoncus, eĉ malmultekoste, nur al kvardeko da homoj, el kiuj la pli granda nombro estas ekonomiistoj aŭ librotenistoj. Anoncoj fariĝas signifaj nur se ĉiu 'komerca kolego' ilin legas, ilin studas, ilin memoras kaj pri ili parolas al konatuloj. Nome: ili 'transdonu laŭtigante' la mesaĝon.

Se ĉiu el ni tiel agos, ni konstatos:

- efektiviĝon de nia klopodoj;
- plifortigon de IKEF;
- disvastigon de Esperanto,

kaj tio sufiĉus!

Marco Picasso.

RECENZO.

Ankoraŭ taskon por IKEF.

Key words in international trade, (Ŝlosilvortoj en internacia komerco); Paris: International Chamber of Commerce, (ICC); dua eldono, 1985. Prezo: 1 350 b.fr.

La Internacia Komerca Ĉambro estas internacia organizaĵo, kun sidejo en Parizo. La laborlingvoj estas la franca kaj la angla. ICC okupas sin, inter alie, pri regulado de internacia komerco, precipe el la vidpunkto de bankado. Bone konata estas la regularo pri dokumentitaj kreditoj, (Uniform Customs and Practices for Documentary Credits), kun tradukoj jam en pluraj lingvoj.

En 1981, ICC aperigis komercan

fakan terminaron plurlingvan. La baza lingvo estas la angla, kun tradukoj en la germana, hispana kaj itala lingvoj.

La reeldono, pliampleksigita, aperis en 1985, (ICC Publ. 417). La libro enhavas preskaŭ 1 500 terminojn sur pli ol 300 paĝoj.

Tiu ĉi libro gravas por IKEF pro la simileco al la Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro de Munniksma. Pli precize: reeldono de tiu vortaro far Eldonejo Kluwer ne plu havas sencon kiel bazan taskon por IKEF.

Mi tamen konstatas ankoraŭ taskon por nia Fakgrupo: pristudi la eblecon de eldono de vortaro simila kiel tiu ĉi de ICC sed kun angla, Esperanta kaj kelkaj nord- kaj orient-eŭropaj lingvoj.

Kion pensas la membroj de IKEF pri tio, aparte en tiuj landoj? Mi havas la impreson, ke ICC bonvenigus projekton en kunlaboro kun orient-eŭropaj landoj.

Roland Rotsaert.

Notoj de la redaktoro.

Kiel kutime en la E.-gazetaro, tiel ankaŭ en la Laŭokaza Novaĵletero: la opinioj esprimitaj en subskribitaj artikoloj estas propraj al la aŭtoroj mem, kaj ne necese estas subtenitaj de la ceteraj membroj de IKEF.

Respondoj al artikoloj estas ĉiam bonvenigataj, kaj laŭeble aperos en la paĝoj de la LN-o, sed la redaktoro konservas la rajton mallongigi aŭ koncizigi ensenditajn manuskriptojn.

----- 0 -----

Interŝanĝo de ideoj

La ĉefa temo por interŝanĝado de ideoj lastatempe estas tiu de terminologia laboro flanke de la Fakgrupo. Unu spuro de tio evidentiĝas per la multas laŭdoj donataj al la Komerca Ĉambro en Bar-le-Duc, Francio, pri la uzado de la i.l. dum indeksado de la produktaĵoj de la moza regiono, kaj alia spuro estas la recenzo, aperanta ĉe alia paĝo tie ĉi, de plurlingva terminaro por uzado dum internaciaj komercaj rilatoj.

Via Estraro tre pozitive agis al reklamanonceto, dise aperigita en la E.-gazetaro, proponante la starigon de internacia tradukretaro kun plene komerca celo. Tiu propono, el Clary en Francio, de S-ro Bodson, meritas pripensadon de ĉiuj niaj membroj kiuj iel povas dediĉi tempon kaj energion al la propono.

Baze, S-ro Bodson volas organizi reton de asocioj en pluraj - finfine en multaj -- landoj, tiel, ke mendo de traduko el iu nacia lingvo en alian nacian lingvon efektiviĝu per regule organizitaj paŝoj, uzante la tradukasociojn.

La originala teksto irus al asocio en lando kiu ĉiutage uzas la lingvon de la teksto, kaj tiu asocio farus fidelan tradukon en E.-on. Tiu internacilingva teksto irus al la asocio en la lando de la cellingvo, kaj tiu asocio preparus la finan tekston traduko el Esperanto.

Por la servo, la kliento farus komerce realan pagon, kaj al tiaj pagoj la mastrumado de la retaro estus certigita.

Dum diskutado en la Estraro de IKEF, du kongruaj sintenoj evidentiĝis.

Klare estas, ke starigo de tia tradukretaro neniel kontraŭas al la agadplano de la Fakgrupo, kaj ni nur volas, ke ni disponus jam pri multe pli da membroj por ebligi al ni tuj proponi la formigon de la tradukasocioj inter

nia propra membraro. Ligita kun tio estas la espero, ke aktivuloj allogitaj al la laboro pro la iniciato de S-ro Bodson, baldaŭ aliĝos al nia Fakgrupo por tie partopreni ankaŭ en la aliaj agadoj de nia agadplano.

La dua sinteno estas tio, ke iu tia tradukretaro pli efike funkcias se ĝi baziĝas sur uzado de komputoroj, interligitaj pere de la telefona retaro. Tiel, transportado de la ponta teksto okazus elektronike inter la du landoj, kun granda ŝparo de tempo. Kroma merito estus tio de unuforme bona prezentado de la finaj tekstoj al la (pagantaj!) klientoj.

Sed el tiu dua idearo, pluraj diskutindaj temoj leviĝas. Elstare inter ili estas la konstato, ke nenia komputoro en la mondo kapablas trakti la internacian lingvon en la bezonata maniero; Sekvas, ke la unua paŝo devas esti la plenumado de la desegno por tia komputoro, proponita jam en 1983 sed neniam efektivigita.

Alia konstato estas tio, ke la terminologia laboro de IKEF estus pli efike plenumata se simile ĝi baziĝas sur retaro de komputoroj en pluraj landoj. Sendepende de tiu ĉi diskuto, venis al nia atento la propono de S-ro Eichholz en Kanado, transiri al uzado de komputoro por daŭrigi la laboron super la Slipara Vortaro de teknikaj terminoj.

Iom ligita kun la diskuto, ni faris kontakton kun la nove starigita Terminologia Sekcio de UEA en Budapeŝto, tion ĉefe por peti informojn pri konkretaj planoj de tiu Terminologia Sekcio, sed ankaŭ por deklari, ke, principe, nia Fakgrupo subtenas la laboron. El la publikigitaj informoj de tiu T.C. klare estas konstato, ke iu tia terminologia laboro dependas je solida financa bazo; kun tia konstato ni klare konsentas, sed neniu scias pli bone ol ni, ke ĝis nun tia financa bazo tute mankas.

Tute hazarde, du Estraranoj viaj trovis, ke ili disponas pri personaj komputoroj de la sama marko, kvankam ne de la sama amplekso. S-ro Rotsaert havas komputoron de la marko, Amstrad-Schneider PCW8256, dum S-ro Mee havas la pli modestan CPC664 de la sama entrepreno. Ambaŭ el tiuj du komputoroj konformas kun la bazaj postuloj por esti adaptata al Esperanto laŭ la 1983-a proponaro, kvankam nek unu nek la alia estas uzebla por ni sen tia adaptado.

Estus interese ekscii, ĉu aliaj membroj de IKEF disponas jam pri persona komputoro, kaj se jes, de kia marko kaj kapableco. Via Ĝ.S. pretas kolekti kaj disponigi, (ekzemple por raporto en la LN-o), informojn tiurilatajn.

Samtempe, iu membro kiu jam pripensas aĉeton de persona komputoro kaj volas legi konsilojn pri taŭga marko, prenante en konsideron la ideon iam adapti ĝin por Esperanto, povas fidi, ke aĉeto de la Amstrad-Schneider PCW8256, aŭ la PCW8512, estas saĝa elekto. Se la disponebla mono estas pli modesta, tiam la CPC664 estas ankoraŭ rekomendinda, kvankam la elpresadkapableco estas severe limigita.

Entute, la paĝoj de via propra organo restas malfermaj por vi diskuti aŭ diskutigi la uzadon de komputoro por iu agado en la agadplano de via propra Fakgrupo.

Ek al la plumoj !

Lorenc' Mi.

postskribo.

Interesa manko ĝis nun en la reagoj pri la eldonaĵo de la Komerca Ĉambro en Bar-le-Duc, (mankanta, almenaŭ, en la reagoj kiuj venis al la centra sidejo de IKEF), estas propono prepari aŭ preparigi tradukojn de la varlisto en aliajn lingvojn.

Ĉu la emo al terminologia laboro efektive mortis jam en nia rondo? Espereble ne!

Ek al la vortaroj !

lm

Okazaj informeroj*La sistemo de impostoj pro aldonita valoro.*

Impostoj en la formo prialudita en la titolo estas ĝenerale uzataj tra la Eŭropa Ekonomia Komunumo, sed malmultaj aliaj landoj uzas precize la saman sistemon. Por legantoj en tiuj aliaj landoj, priskribo de la esencaj trajtoj de la Imposto pro Aldonita Valoro, (IAV aŭ i.a.v.), eble havus intereson. Jen sekvas konciza raporto post spertoj en la sistemo kaj esploroj en la bazaj regularoj.

Impostoj pro aldonita valoro apartenas al la kategorio de nerektaj impostoj, por fari distingon inter ili kaj la rektaj impostoj ordinaraj kalkulataj pro salajrenspezoj, rentumoj kaj simile. Al la kategorio de nerektaj impostoj apartenas ankaŭ akcizoj kaj doganimpostoj, kaj, en multaj landoj, vendimpostoj.

Por taŭge kompreni la apartajn trajtojn de i.a.v., valoras dediĉi kelkajn vortojn al konsidero de tiu lasta formo, la vendimpostoj, ĉar tiu formo de imposto malaperas en tuto ĉe enkonduko de impostoj pro aldonita valoro.

Esence, vendimposto devigas la aldonon ĉe butikoj kaj aliaj vendejoj de fiksita proporcio de iu vendosumo de varoj aŭ servoj vendataj al konsumanto; la sumo de tiuj aldonitaj sumoj estas pagata al la ŝtato aŭ urba instanco. La sistemo estas facile administrebla, kaj facile komprenebla al la konsumanto.

Malavantaĝo, de la vidpunkto de la ŝtato aŭ alia kolektanta instanco estas, ke la imposto leviĝas nur je la fino de foje longa vico de traktaĵoj, kiuj okazas inter unuafoja uzado de kruda materialo kaj fina vendo al la konsumanto; tiu kolektanta instanco ŝatus pli frue enspezi la imposton, se eblas. Krome, la sistemo estas iom rigida en tio, ke la proporcio devas esti universale aplikebla kaj malalta por ne tro forte imposti varojn pli-malpli esencajn.

Kaj en la praktiko, oni sufiĉe ofte trovas metodojn vendi varojn sen la kolekto de la imp-

osto, kaj sen la konservado de dokumentoj kiuj ebligas al la koncerna instanco pruvi la neceson kolekti la imposton.

Jam dum kunmeto de la Traktato de Romo, do, oni formulis alternativan sistemon, kaj poste la uzado de tiu ĉi alternativa sistemo fariĝis deviga por membroj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo, kvankam la efektivaj impostniveloj restas afero de la membroj-ŝtatoj mem.

Sub i.a.v., la konsumanto pagas la imposton. Tiu imposto estas proporcio de la vendoprezio, kaj kutime estas jam enkalkulita en tiu vendoprezio sen aparta informo al la aĉetanto-konsumanto. La nivelo de la imposto povas esti malpli alta je tiel-nomataj esencaj varoj ol je aliaj ordinaraj varoj. Por certaj, aparte difinitaj (profesiaj) servoj, la nivelo de la imposto estas nulo.

Kvankam, plej laste, la konsumanto devas porti la ŝarĝon de la imposto, la pli granda parto de la sumo de tiu imposto esti jam pagita al la koncerna instanco antaŭ ol la varo venis por vendado al la butikisto aŭ alia vendisto. Por ebligi tion, parto de la imposto estas pagita je ĉiu paŝo de la produktada procedo, kaj je ĉiu tia paŝo, la imposto estas simile kalkulita laŭ la vendoprezio de la parte finita produkto.

Imagita ekzemplo klarigas la sistemon. Jen!

Iu entrepreno akiras krudan materialon per importado, kaj pagas por unuopa kvanto de ĝi,

inkluzive de doganimposto, la sumon de 100 Steloj. Tiu entrepreno per iu laboro faras el ĝi ne-finitan produkton, kaj vendas unuopan kvanton de ĝi al alia entrepreno por la sumo de 200 Steloj. La fakturo por tiu traktajo estas, (se la impostnivelo estas 10 procento), 220 Steloj.

La unua entrepreno nun havas 20 Steloj kiuj apartenas al la ŝtato, sed tamen rajtas subtrahi la sumon de la doganimposto, (ni diru, 5 Steloj), kaj do pagas al la ŝtato la sumon de 15 Steloj.

La dua entrepreno faras polurigan aŭ alian laboron, kaj vendas unuopan kvanton de tiu finita varo al butikoj por la sumo de 400 Steloj. La fakturo por tiu dua traktajo estas 440 Steloj; la dua entrepreno pagas al la ŝtato 20 Stelojn, pro la rajto subtrahi la 20 Stelojn jam pagitajn al la unua entrepreno.

La butikisto fiksas bazan vendoprezon al konsumanto de 550 Steloj, sed la efektiva vendoprezon estas 605 Steloj, pro la aldono de i.a.v. je 10 procento.

Tiu butikisto pagas al la ŝtato la sumon de 15 Steloj, denove pro la rajto subtrahi la imposton pagitan.

La sumo de la imposto estas, do, $(5 + 15 + 20 + 15) = 55$ Steloj. Estas facile kompreni, ke la efektiva, neta imposto leviganta je ĉiu paŝo, estas proporcio de la valoro aldonita dum tiu aparta paŝo. El tiu konstato venis la nomo de la sistemo.

Flanka avantaĝo de la sistemo levigas se tiu dua entrepreno vendas unuopan kvanton de la varo al kliento en alia lando. Tiaj eksportaj traktajoj okazas je nivelo de nulo procenta impostado. La fakturo por tia traktajo, do, estas en la sumo de 400 Steloj, kaj la entrepreno rajtas re-havide la ŝtato la imposton de 20 Steloj antaŭe pagita al la unua entrepreno.

En la praktiko, la diversaj entreprenoj raportas dek-du-foje

en la jaro pri aĉetoj kaj vendoj, kaj pagas al la kolektanta instanco la netan sumon de imposto alvenantaj dum la ĵus finita monato, prenante en konsideron la impostojn pagitajn dum la sama periodo. Ĉar en ĉiuj tiaj traktajoj, la sumo de la imposto por tiu aparta traktajo estas klare indikita en la fakturo, la kalkuloj estas faciligitaj, kaj posta kontrolo, ĉu fare de revizoro aŭ alia instanco, estas rapida kaj facila tasko.

Ĉiu aparta lando en la E.E.K. havas propran liston de varoj kaj servoj liberigitaj de impostado sub tiu ĉi sistemo, kvankam la diversaj listoj estas ĉiuj tre similaj unu al la aliaj. Por akiri fidindan konon de la koncernaj aranĝoj, necesas fari informpeton pri la reguloj en la aparta lando. Generale, tamen la varoj liberigitaj estas la tiel-nomataj vivtennepraĵoj kiel pano, legomoj kaj tiel plu, sed foje ankaŭ libroj kaj gazetoj, kaj la servoj liberigitaj estas tiuj por edukado kaj (re)sanigado, sed inkluzive de poŝtservoj, transportado, asekurado kaj similaj servoj esencaj. Luksaĵoj kiel aŭtomobiloj kaj simile ofte portas pli altan nivelon de imposto, kaj la akcizoj por alkoholaĵoj kaj simile restas netuŝataj de la sistemo de imposto pro aldonita valoro.

Lorenc' Mi.

Notoj.

La aŭtoro agnoskas valoran helpon dum kompilado de la artikolo per uzado de la Plena Vortaro, la Int. Kom. kaj Ekon. Vortaro, (IK EV), kaj de la verkoj 'Dutch Business Law' kaj 'Pear's Cyclopaedia', sed senrezerve prenas mer plenan respondecon por la enhavo de la artikolo.

La Stelo estas la stabilvalora internacia monunuo de la Esperantistoj; la uzado en tiu ĉi artikolo ne implicas, ke la Stelo estas en ĝenerala uzado en la Eŭropa Ekonomia Komunumo.

Ni eluzis ĉion,

kiun ni ricevis!

Pri pagoj al ni.

IKEF ĝis nun ne havas apartan bankrilaton, sed utiligas por ĉiuj financaj traktaĵoj konton en la kontaro de Mondkomerca Eldonejo Esperantista, ĉe la adreso:

P.O. Kesto (Postbus) 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederlando.

Tiu Eldonejo tenas poŝtĉekkonton, numero 361 47 95 ĉe la nederlanda Poŝtbanko, (antaŭe: nederlanda poŝtĉekinstanco).

Membroj de IKEF pagas jarkotizon en la sumo de dudek guldenoj, valida por kalendara jaro. Ĉefe al realtiva malaltigo de kostoj kaj laboroj, ni ĉiam konsilas al pago por kelkaj jaroj en anticipo. Anticipa pago por dudek jaroj aŭtomate provizas membrecon dumvivan.

La du plej rekomendindaj metodoj fari pagon al ni estas aŭ per rekta transpago al la poŝtĉekkonto de K.E.E., el propra poŝtĉekkonto via, aŭ per aĉeto de internacia poŝtmandato ĉe la poŝtoŭicejo kaj citante la nomon de la Eldonejo. En ambaŭ kazoj, bonvolu aldoni la mesaĝon: 'por IKEF'.

Ni provas starigi trian eblecon, tiu de rekta pago al Peranto en via lando; ĝis

nun ni havas konsenton en principo pri U.K.-Germanio kaj pri Italio, sed la detaloj estas ankoraŭ prilaborataj. Intertempe, ni serĉas sinanoncojn de membroj pretaj esti Perantoj en aliaj landoj.

Foje oni volas fari pagon per uzado de internaciaj respondkuponoj. Tio estas realtive multekosta metodo por la paganto, sed ĝi estas tute akceptebla kaj malmultekosta metodo por ni. La kosto de jarkotizo estas dudek tri irpk-oj.

Alia praktika metodo estas la aĉeto de portiletoj nederlandaj, kaj ilin sendi al ni per registrita poŝto. Ĉiu restanta sumo post enkasigo estos konservita por ni en persona konto.

Alia tre kosta metodo estas la uzado de persona ĉeko via, al la persona nomo de Jero L. Kee kaj kun la aldono de kvar kaj duono guldenoj, ĉefe al duonigo por ni de la ne-eviteblaj kostoj de enkasigo.

Lasta ebleco estas fari pagon tra Universala Esperanto-Asocio, ankaŭ en Roterdamo, por tiuj el vi kiuj tenas konton tie. Faru mencion de la nomo, Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, kaj ULA aŭtomate elpagos la sumon al ni.

La Perantoj de IKEF.

Ni prenas plian paŝon

antaŭan!

Kvankam malrapide, kiel agnoskas nia Prezidanto en la nefermita letero je pagoj unu kaj du, la aferoj de la Fakgrupo iom post iom progresas kaj plibonigadas.

Per publikigo ĉi-foje de nova membro-listo, ni atingas la ciferon de dudek por la nombro de landoj en kiuj ni havas membrojn, ekzemple, kaj verŝajne ni sufiĉe baldaŭ atingos la ciferon de kvindek por la nombro de membroj.

Kiel atingoj por internacia fakorganizaĵo, tiuj ciferoj estas ankoraŭ modestaj, sed ke ni sukcesis atingi ilin en la daŭro de malpli ol unu jaro post la oficiala Fondkunveno estas afero, pri kiu ni ja povas senti fieron.

Lastatempe, ni faris alian gravan paŝon: ni nomis Perantojn de IKEF en kvin landoj. Per tio ni provas plifaciligi varbadon en tiuj landoj, ĉefe per plifaciligado de problemoj fari pagojn de kotizoj. Perantoj rajtas emisii kvitancojn en la nomo de IKEF, plusendante al la centra sidejo aliĝilojn pro novvarbitoj, kaj kotizorenovigslipojn pro jamaj membroj. Laŭeble, varbado per reklamoj okazos pli ofte pro lokancado, anstataŭ tia de la centra sidejo, kaj oficiala reprezentado de IKEF dum naciaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas ebligita.

Tiu ĉi nia starigo de la reto de Perantoj estas ankoraŭ tiel nova afero, ke ne eblas rakonti iujn rektajn atingojn, sed niaj esperoj restas ampleksaj.

Membroj en la koncernaj landoj estas petataj starigi aŭ plibonigi kontaktojn kun la Peranto, kaj membroj en aliaj landoj estas petataj doni konsideron al la ideo fariĝi Peranto por ni en la propra lando.

La Perantoj de IKEF,
1986 - 06 - 15.

Britio:

S-ro P. Poss,
Long House Hotel,
Pilton, Som., BA4 4BP;

Francio:

S-ro F.-X. Gilbert,
Vert Coteau,
Longeville-en-Barrois,
55000 Bar-le-Duc-

Okc.-Germanio:

S-ro F.J. Braun,
Hornisgrindestrasse 8,
7580 Bühl 16;

Italio:

D-ro M. Picasso,
via De Gasperi 7,
20057 Veduggio al Lambro;

Jugoslavio:

S-ro S. Taleski,
ul. 'Oslo' br 12,
91000 Skopje.

----- 0 -----

La Propaganda Konto de IKEF.

Ligita kun tiu nia starigo de reto de Perantoj, ni volas plifirmigi nian varbagadon per starigo de Propaganda Konto, el kiu pagi la kostojn ne-eviteblajn.

Tiuj kostoj de varbmateriale, provekzemplerojn de la LN-o, kaj simile restas kaŝitaj en la kontaro ĝis nun; aliaj kostoj, por reprezentado dum kongresoj, aŭ por vera kampanjo disvastigi lekonon de la ekzisto de nia Fakgrupo, ne okazis ĝis nun, pro la fakto, ke ni ne havas fonton de mono el kiu pagi ilin. Nia Propaganda Konto estas malplena!

Esperable, interniaj legantoj estas persono aŭ personoj kiu(j) rekonas la gravecon por ni de tia konto. Restas ankoraŭ ŝanco esti la unua donacinto! Ni publikigos la nomojn de ĉiuj donacintoj, kiel kutime.

Anticipan dankon!

paĝo dek du

REKLAMANONCOJ

Reklamtarifoj:

a) por Membroj de IKEF:
unu anonceto ĝis inkluzive
s e s linioj: senpage;

por pli longaj anoncetoj:
po 1 respondkupono, (irpk),
por ĉiuj komenciĝantaj ses
linioj.
Ĉiam unuope mendendaj.

b) por ne-Membroj de IKEF:

po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ
por ĉiuj tri milimetroj de
longeco, enkadrigita,
sed kun minimumo de ok
irpk-oj. Ĉiam antaŭpagita.
Por anoncoj je pli granda
larĝeco ol unu kolumno:
laŭ aparta interkonsento.
Ĉiam: tri aperoj de la sama
anonco en sinsekvaj kajeroj
por la prezo de du aperoj.

kurzo: 1 irpk = 0,90 gld.

REKLAMANONCOJ

S-rino G. Salomon, 8, rue
E. Lacoste, 75012 Paris,
Francio, mem Esperantistino,
deziras studi eblecojn kun-
labori kun nederlanda Esp-
erantista komercanto.

Tiu
ĉi
spaco
estas
rezervita
por vi!

La Stelo.

La valida kurzo por la Stelo
nunatemp en Nederlando
estas: 1.00 guldano egalas
al 1.360 Steloj.
Respondeas: M.E.W., Ned.

Atentinda el Belgio: revuo
Spaco por paco, aperas kvar-
foje jare. Petu informojn
de: Movado sen Homo,
Vredestraat 47,
2600 Berchem, Belgio.

REKLAMANONCOJ

Atentinda el Ĉinio: Revuo
Tutmondaj Sciencoj kaj Tek-
nikoj, aperas kvarfoje jare,
sub aŭspicioj de la Ĉina
Akademio de Sciencoj. Petu
informojn pri aboneblecoj.

Atentinda el Suda-Koreio:
Revuo La Espero el Koreujo,
aperas sesfoje jare, riĉe
ilustrita pri rapide evolu-
anta lando. La Redaktoro
estas Membro de IKEF.

Pensu pri
Mondkomerca Eldonaĵo
Esperantista
por viaj komercaj bezonaĵoj.
P.O. Kesto 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederl.

Reklami estas informi;
ju pli vi informas,
des pli vi vendas.
Uzu la senkoston servon de
via propra komunikilo:
La Laŭokaza Novaĵletero.

ONDO

Import & Distributing, Inc.
Box 99, Verdun, H4G 3E1, Kanado,
Tel.: (514) 871 8757; Telekso: 05-25134-ondo.

KOMERCAS PRI

metalaj varoj por ĝenerala pub-
lika uzado, prefere novaj al la
merkato, en Norda Ameriko.

Ĉi tiu entreprenestro, Membro de IKEF,
pretas reprezenti ankaŭ vin!

ENTREPRENO PRODUKTANTA
SPECIALAJN FROSTIGILOJN por
nutraĵoj, en hospitaloj, restoracioj
kaj glacimaŝinoj,

SERĈAS AGENTOJN, ĉie.

ESPERANTISTOJ! Helpu trovi
taŭgajn seriozajn agentojn.

Speciala premio atendas vian sukceson.

Skribu al: Marco Picasso,
20057 Veduggio al Lambro. (MI). Italio.

Pri reklamanoncoj.

Apude troviĝas du reklamanoncoj pli
grandaj ol eblas en la supra parto de tiu
ĉi paĝo. Por ambaŭ, nia kaso ricevis
pagon; pro ambaŭ ni esprimas dankojn al
la mendintoj.

Eble interesus legantojn ekscii la
rezonadon malantaŭ la atingo de la
'aparta interkonsento' en tiuj ĉi kazoj.
Ĝi estas sufiĉe simpla proceduro!

Por okonpaĝa anonco, kiel tiuj ĉi du,
ni fiksis la koston esti la sama kiel por
jarkotizo. (Se la jarkotizo plialtiĝos,
aŭtomate la kosto de okonpaĝa anonco
plialtiĝos!)

La grandeco de la kadro en la orig-
inalo estas 88 oble 66 milimetroj.

Ĉi-foje, la 'kompostado', per deseg-
nado-Ŝablonoj, okazis ĉe la eldonanto,
sed ni pretas akcepti prespretajn orig-
inalojn, se oni respektas la grandecon.

Por kvaronpaĝa kaj pli grandaj an-
oncoj, la grandeco kaj prezo estas pro-
porcie pli altaj. Okonpaĝa anonco estas
la plej malgranda akceptebla.